# KVINPETALO (SYM)

## *NOVAĴLETERO*

Aprilo 2025



## Aprila staĝo : Promeno tra la biblioteko : la sezonoj (7-11 aprilo)

Dum tiu semajno, vi povos **eniri en la riĉecon de la esperantlingva literaturo**, ĉu originala, ĉu tradukita. Por tion fari, temo estis elektita : la sezonoj. Vi legos kaj prezentos tekstojn poeziajn kaj prozajn al la aliaj. La gvidanto elektis kelkajn verkojn, sed vi povas ankaŭ veni kun ŝatata teksto aŭ libro pri kiu vi emus paroli, eĉ se ĝi ne rilatas al la temo. Ni estos tie por ĝui la literaturon kaj la lingvon, kaj por dividi tiun ĝuon kun la aliaj en nia tradicia familia etoso. Se vi ĵus malkovras la esperantlingvan literaturon, vi ne mistrafu tiun enkondukon al pli bona kono.

## Maja staĝo : Harmonia ĝardenumado, por postaj promenoj (12-19 majo)

En niaj evoluintaj landoj, ni kondutas kvazaŭ ni posedus kvar Terojn je nia dispono. La ideo ke la naturo kontraŭas la homaron - ĝian kulturon esence - ne estas universala, ĝi eĉ estas sufiĉe freŝdata okcidenta elpensaĵo.
Por ke niaj gefiloj kaj genepoj havu la eblecon pluvivi en loĝebla Tero, nepre ni ŝanĝu nian sintenon rilate al la aliaj vivantaĵoj. Ŝanĝi nian gluteman civilizacion aspektas eble kiel grandega utopia defio (!), sed komenci en niaj ĉirkaŭaĵoj eblas ofte per simplaj rimedoj. « Nur la unua paŝo kostas » diras la proverbo.
Inter niaj domoj kuŝas ĝardeno kiun oni planas aranĝi por favori la biodiversecon. Kvinpetalo membriĝis al la asocio LPO por protekti kaj gastigi la birdojn. Ofte pro indiferenteco aŭ nekono ni seniĝas je la plezuro kontakti la aliajn vivantaĵojn. Admiri, kontempli, observi estas la unuaj paŝoj al respekto kaj pli bona kono.
En tiu staĝo ni lernos kiel riĉigi la diversecon en nia ĝardeno : ne tro draste falĉi nian razenon por akcepti sovaĝajn florojn kaj inviti papiliojn, nutri la grundon per kompoŝto, elekti la specojn de arbedoj kaj arboj plej konvenaj por loĝi kaj nutri la sovaĝajn bestetojn, instali lignan nestujon por la birdoj… Vi pensos… kaj agos. Pensu preni konsekvencajn vestaĵojn.
Ĉar niaj someroj pli kaj pli varmas, nepre ni proponu specialan lokon por ke la bestoj kiuj soifas kaj bezonas bani sin trovu akvon je sia dispono. Oportune ni havas amason da disponeblaj ŝtonoj por konstrui belan basenon por niaj flugantaj kaj naĝantaj fratetoj ! Ĝis baldaŭ.

***Por aliĝi al staĝo, sendu la aliĝilon troveblan sur la retpaĝo al*** **kasisto.kvinpetalo@sfr.fr*****, aŭ poŝte.***

## Kluboj

Estas daŭre ebleco por la proksimaj kluboj uzi la centron **por semajnfina "seminario".**
**Nepre, kontaktu nin por kunorganizi tiajn eventojn.**

## Donacoj

**Ni tre kore dankas al la kelkaj jam donacintoj en 2025**. Ni bezonas pluan financan subtenon.
**Se ni ne trovas sufiĉajn donacantojn, ni devos ĉesigi la agadon.**

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. **http://kvinpetalo.org**
Ĉekoj al **Société Yvonne Martinot**
Ĝiro al Société Yvonne Martinot, **IBAN** : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, **BIC** : PSSTFRPPLIM
Ĝiro ĉe UEA al **konto *syma-l*** kun indiko "Donaco de ...".
Sendu paralele retmesaĝon al kasisto.kvinpetalo@sfr.fr.